# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

7a jarkolekto n-ro 3
marto 1987

A T E N T I N D A Ĵ O J

11 04 1987 : estrarkunsido de FEL

09 + 10 05 1987 : PEDAGODIA SEMAJNFINO
vidu p. 2

23 05 1987 : Informtago pri Kursoj
Tiu ĉi informtago, organizita de FEN-LABORGRUPO okazos en la Esperantodomo, Riouwstraat 173, DEN HAAG.
Kotizo : N. gld 7.50 ĝis 16 05 1987. Poste gld 10,00
ĝirenda al la ĝirkonto 2315416, NGGE, Nijmegen
Info :Gerard Gerritse, Meijhorst 17-55, NL-6537 KE
NIJMEGEN, tel 080 446803
00-31-80-446803

P E D A G O G I A   S E M A J N F I N O

| | |
|---|---|
| Por : | personoj kiuj ŝatus gvidi kurson<br>personoj kiuj gvidas kurson sed ŝatus plibonigi sian pedagogian formiĝon |
| Kiam : | 09 k. 10 05 1987 de 09.00 h. - 18.00 h. |
| Kie : | Klubejo de LA VERDA STELO, Frankrijklei 140<br>2000 ANTWERPEN |
| Kostoj : | BEF 1500. Tiu sumo inkluzivas 2 panmanĝojn + trinkaĵoj dum 2 manĝoj kaj 4 paŭzoj |
| Kursgvidanto : | S-ino Audrey Childs - Mee |
| Programo : | - ĝeneralaj pedagogiaj principoj de lingvoinstruado<br>- principoj de rektmetoda lingvo-instruado kaj la teknikeroj de tiu metodo<br>- ecoj de Esperanto<br>- lingvaĵoj instruotaj en baza kurso, laŭ pedagogia vidpunkto<br>- konsisto de kursoj, speciale por komencantoj<br>- uzebla materialo<br>- instruhelpiloj<br>- sinpretigo al instruado<br>- administrado de kursoj<br>- kiel organizi unuopajn lecionojn<br>- aranĝo de instruejo |
| Enskribiĝo : | antaŭa anoncado nepras<br>bonvole pagu en la konton 402-5510531-55<br>aŭ 000-0265338-43<br>de FEL kun la mencio : "PEDAGOGIA SEMINARIO" |



REBATA SERVO

Kelkaj konsiloj de Germain Pirlot :

1. Ni ne tro facilanime pensu, ke pro grandaj artikoloj la publiko fariĝas bone informita pri Esperanto.
   Evidentiĝas, ke multaj homoj rimarkis, ke ĉi jare io aperis pri Esperanto, sed tre malmultaj legis la artikolojn. Pli gravas regula reapero antaŭ la publiko ol la enhavo de granda artikolo. Tial necesas ke simplaj membroj reagu al la redakcioj por montri interesiĝon. ANkaŭ necesas, ke lokaj grupoj ofte raportu pri loka agado.
2. Du aŭ plurlingvaj informaj broŝuroj konstante informas publikon pri ekzisto de Esperanto. Esperantistoj proponu sian kunlaboron, precipe al lokaj muzeoj, ĉiĉeronoj, internaciaj organizaĵoj ktp.
3. Oni fondu en la biblioteko de Antwerpen fakon kun gazeteltondaĵoj pri lingvaj problemoj.

Statistikoj pri ricevitaj eltondaĵoj :

| | | aludita | artikoleto | artikolo/programo |
|---|---|---|---|---|
| januaro : | gazetaro | | 2 | 1 |
| | radio | | | 6 |
| | TV | | | 1 |
| februaro | gazetaro | 1 | 1 | 9 |
| | radio | | | 2 |
| | TV | | | |

--------

Anonco :

Marco DUTRA, Brazilano, ŝatus prelegi en Belgaj urboj.
Unu prelego jam estas planita je la 10 de aprilo en LA VERDA STELO Antverpeno.
Eblas ekde tiam aranĝi ion kun li. Li faros longan vojaĝon tra Eŭropo.
En sia urbo, Rio de Janeiro, li laboris kiel sciencisto biologio-ĥemio.

Kontaktadreso : Marco Dutra
p/a Kultura Centro Esperantista
BP 771
CH 2301 LA CHAUX DE FONDS

---------

## PROTOKULO

pri la estrarkunsido de sabato 14-a de marto 1987 en A'pen.

Ĉeestas : Erik D'hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR), Edward Symoens (ES) kaj Jan Bovendeerd (JB)

Prezidas : ID

Protokolas JB

Komenca horo : 08.45 h.

1. La protokolo pri la estrarkunsido de 14 02 87 estas aprobita, krom ke mankas la teksto sub 2.6. Jen ĝi :

" RR prizorgas por FEL-membroj, kiuj ne ŝatas mem internacie pagi kaj korespondi, la administradon (kaj eventuale plendojn) pri abonoj kaj reabonoj al eksterlandaj revuoj. La uzantoj de la servo tamen havigu al li la necesajn informojn : ekz. kopion de anonco pri la abonata revuo, kopion de la paĝo kun abonkondiĉoj, adresetikedon de la lasta numero ktp."

2. Kunordigado :

2.1. Sekretariaj problemoj ;

JB ne povas daŭrigi la sekretarian laboron pro materia maleblo (ekz. manko de tajpilo) kaj pro tempomanko. Necesas do trovi anstataŭanton.

2.2. Preparo de la posttagmeza ĝenerala kunsido.

Ni sekvos la kutiman sinsekvon :

- unua parto :
  - grupa raportado
  - financa raporto + eventualaj laborgrupaj raportoj
  - sekretaria (morala) raporto
  - prezidanta vorto
  - aljuĝo de la premio pri membrar-kresko
- dua parto :
  - eksiĝo de la estaro
  - akcepto de la administrantoj
  - elekto de nova estraro
  - elekto de nova prezidanto
  - propono de nova laborplano (sloganoj, lerneja projekto, seminario por instruantoj, membrokotizoj)

2.3. Membrokotizoj



Laŭ detala kalkulo FEL perdas po BF 180 por ĉiu membro pro administraj kostoj, abonoj ks.

Do normale la parto kiun FEL bezonas estas, anstataŭ po BF 150, po 330 F.

Ekzistas diversaj manieroj :
- ĉu altigi
- ĉu transiri al libera kotizado
- ĉu nenion ŝanĝi, malgraŭ ĉio

La afero estos antaŭmetata al la ĝenerala kunsido por pripensado kaj fina decido okaze de la oktobra ĝenerala kunsido.

2.4. Honorigado

Pro lia meritplena laborado en la BRT-medioj, Louis Janssens estu honirigata. Li tamen ne venos al la hodiaŭa kunsido, sed jes al la jubilea kunveno en Bruĝo. La prezidanto profitas de tio por transdoni al li nian donacon publike.

2.5. Slogan-konkurso

Envenis ĝis nun pluraj dekoj da ensendoj. Partopreno eblos ĝis 27 03 1987. Tiam la proponoj estos submetotaj al nia profesia reklamkonsilanto por unua ekzameno. La definitiva aljuĝo okazos je 04 04 87 en Amersfoort okaze de la Nederlanda kongreso.

2.6. Regularo de Interna Ordo

Post ekzameno de la regularo, precipe pri la aliĝkondiĉoj de lokaj grupoj, la estraro opinias (finfine) necese apliki art. 2.3. laŭ kiu ĉiu urbo aŭ vilaĝo havu nur unu grupon.

2.7. Rilatoj kun BEF

La problemo pri la peranto de UEA en Belgio, provizore solviĝis tiel, ke FEL akceptas kiel peranton Roger De Schepper, kiel proponite en la ĝenerala jarkunsido de BEF, sub la nepra kondiĉo ke la komunikajoj de FEL povas esti uzataj nur por la strikte necesaj kontakoj kun UEA rilate al kotizado.

2.8. SONORILO

Lastatempe konstatiĝis ke flanke de SONORILO okazas pli kaj pli da kontraŭagado kaj sennecesa manforjetado. Ni nome ne forgesu ke la duono de la fondkapitalo de SONORILO devenas de la flandra Esperantistaro. Rilate al tio ID jam diversfoje intervenis i.a. ĉe Gregoire Maertens, sed ŝajne vane.

Evidentiĝas do ke necesas ke ni postulu, kaj eĉ per registrita letero, kunvenon de la administrantaro de Sonorilo kun la FEL-estraro.

3. FINANCOJ

3.1. Ĝenerale niaj financoj estas sanaj. Eĉ malgranda gajno ekzistas malgraŭ grandaj investoj.
RR intencas fari komparon inter la bilancoj de la tri lastaj jaroj.

3.2. ESPERANTO PANORAMA
Prikonsederata estas projekto por instigi al donacado.
La tuj venonta temos pri represo de informmaterialo.

3.3. Alia rimedo de donac-instigo estas la disponigo de verkoj de eminentaj verkistoj kaj sukskribitaj de la aŭtoro.

3.4. STAFETO
Tri verkoj povos aperi ĉi jare : unu de William AULD (jam prespreta), alia de Deck Dorval (kompostata) kaj tria de Gaston Waringhien ( en preparo).

4. INFORMADO

4.1. UNESKO intencas sendi reprezentantojn al 100 urboj. Ili uzos broŝuron Franc-, Angla- kaj Esperantlingvan.
RR proponas proponi al UNESKO tradukon de la broŝuro en la naciajn lingvojn fare de la delegitoj de UEA (se ili volas pagi).

4.2. Eŭropa manifestacio okazos en Bruselo je 28, 29 kaj 30 06 87.
La Brusela grupo prizorgos informstandon. Fleja same.
FEL povos disponigi la infrommaterialon.

4.3. Radioprogramo
La programisto de "Zo de ouden zongen" volus intervjui maljunan Esperantiston.
ID proponas Cesar Vanbiervliet.

4.4. "Ons Erfdeel" 30-jara
ES sendos gratulleteron substrekante ke nia organizo havas signifon por la protekto kaj disvastigo de nia kulturo.

Fino : 12.40 h.

------------------



PROTOKOLO

pri la ĝenerala jarkunsido de sabato 14 de marto en Antwerpen

Ĉiuj grupoj estas reprezentataj krom Bruselo, Knokke kaj Mechelen.

Prezidas : Ivo Durwael (unua parto)
Protokolas Jan Bovendeerd kaj Paul Peeraerts.

I. UNUA PARTO

Komenca horo : 14.00 h.

La protokolo pri la antaŭa ĝenerala kunsido estas aprobita.

2. Grupa raportado ( vidu ankaŭ la aldonitajn detalajn raportojn

2.1. FLEJA
La jarraporto de FLEJA aperis jam en la februara numero de INFORMILO.
Raportas Jean Pierre VandenDaele jene :
Gekaraj,
la fakto ke mi troviĝas ĉi tie antaŭ vi mallonge prezentante la FLEJA-agadeton ne tute estas tre bona afero. Vi jam scias ke mi laboras ĉi tie dumtage kaj nun denove aldoniĝas sekretaria laboro dum miaj mallongaj vesperoj. Tio ĉar ĝis nun ankoraŭ ne eblas trovi anstataŭanton, tiel ke provante tion dum la antaŭa jaro ne pli aperis skriba vivsigno de ni. Kaj tio estas problemo solvenda. Trovi homojn pli junajn kiuj disponas pri tempo kaj entuziasmo. Ne ke tio lasta mankas al mi, alie! mi ne restus en la estraro. FLEJA estas tro valora por esti forigata ! Same por nia ĉi-jara kongreso, kiu daŭre okaza Speciale ĉijare ni bonvenigas ankaŭ 30-plusulojn por nia jubilea kongreso.
Tamen pliboniĝo estontas. Elektiĝis sufiĉe glate nova prezidanto, nome Andre Ruysschaert, kiu sendube ne preterlasos la statutan flankon de nia asocio kaj plej grave ni nun disponas pri reprezentantoj en kelkaj lokaj grupoj, tiel ke FLEJA ne nur restas ligita al Antverpeno. Do, se en via grupo troviĝas ankaŭ junul-(in)o kiu ŝatas kunlabori kun FLEJA, ne hezitu anonci ŝin/lin.
Estas jam reprezentantoj por Aalst, Antwerpen, Gent kaj Leuven.

2.2. ESPERANTO 2000 - Leuven
La informkampanjo en kiu ili investis ± 20.000 f. por reklamo estis tre sukcesa kaj valoris la investon.
Ili refaros ĝin.

2.3. LA VERDA STELO Antwerpen

LVS estas bonfarta. La ĉiusemajnajn klubkunvenojn ĉeestas meze 30-o da personoj. Almenaŭ unu fojon monate okazas internacia vespero, t.e. programo prizorgata de eksterlandano.

Speciala programo estis je 21 02 1986. Tiam vizitis la klubon Bob Cools, urbestro de Antwerpen. Tio kostis el LVS nur unu invitleteron. Jen io imitinda de la aliaj grupoj.

Specialan atenton meritas ankaŭ la - po unu fojon monata - programo "laborgrupoj" en kiu la ĉeestantoj ariĝas laŭ plaĉe en diversaj grupetoj kun same diversaj programoj-okupoj.

Pliaj detaloj pri la programoj de LVS troviĝas en ESPERANTO PANORAMA.

2.4. Limburg

Krom en Hasselt okazas nun ankaŭ kurso en Genk.

2.5. PACO KAJ JUSTECO Brugge

P.k.J.ne havis ekstergrupan vivon. La kongreso en Blankenberge kaj la ĉi jara jubileo forrabis ĉiujn fortojn. Post 21 03 1987 (jubileo) okazos nova kurso.

2.6. LA PROGRESO Gent

Okazas tre sukcesa nova kurso laŭ la rekta metodo, kiun partoprenas 18 fidelaj lernantoj.

La Progreso tradukis broŝuron pri Gent, sed la urbo ankoraŭ ne aperigis ĝin.

Ili klopodadas konvinki siajn membrojn viziti ankaŭ aliajn grupojn.

3. FINANCOJ

Malgraŭ ĉio tamen estas eta gajno. La libroservo estas la plej grava enspez-fonto.

Pliajn detalojn vi trovos en la protokolo pri la matena estrarkunsido.

3.2. Gazetara Servo.

Raporto ne envenis.

LVS kunmetos bendo-tekon de radioprogramoj pri Esperanto. Ĉiuj kiuj posedas surbendigitaĵojn bonvolu kontakti Alex Humet por kopiado.



la pioniro — aalst

afdeling van de vlaamse esperantobond sekcio de flandra esperanto-ligo

esperanto internationale taal

JARRAPORTO 1986

La jaro 1986 jam komenciĝis per granda problemo: nia prezidanto tutsimple forlasis la grupon sen prepari iun personon aŭ la estraron por transpreni la gvidadon de la grupo.

Kelkaj estraranoj tamen prenis la torĉon kaj organizis en februaro kunvenon por priparoli la estontan agadon de la grupo.

Feliĉe ĉio iris glate kaj ni jam kapablis instigi kelkajn neaktivajn membrojn al plia agado.

Malgraŭ la malfacilaĵoj kunvenoj okazis ĉiumonate kaj la nombro da ĉeestintoj variis inter 3 kaj 29. Meznombre ĉeestis 17 membroj, do preskaŭ 40 % de la 45 membroj!

Estis 2 gastprelegantoj, vizito al bierfarejo, duontaga kaj unu dutaga promenoj en la Ardenoj.

Plie nia ĉiujara barbekjuo, spektaklo de jugoslava junulartrupo, distra vespero per komputiloj havis grandan sukceson.

Al la Zamenhoffesto en Gento partoprenis 17 grupanoj de la Alsta grupo. Por fini la jaron, ni kvizis kun la Genta grupo dum nia kristnaskfesto.

De nia klubrevuo aperis 8 numeroj. Do regule ĉiumonate!

Ni organizis du kursojn: unu kurseton de 6 lecionoj por progresantoj kaj unu por komencantoj. Tiu ĉi lasta havis 9 lernintojn je la komenciĝo kaj finis kun 6 lernintoj. De la novuloj preskaŭ ĉiuj aliĝis al la grupo kaj unu jam eniris la estraron de la grupo!

Ni vere havis kaj havas la senton ke ni estis sur la bona vojo kaj espereble ni kapablos daŭrigi nian agadon.

La estraro de La Pioniro.

Sekretariejo - Sekretariaat
Wilgstraat 25 A
B-9440 Erembodegem - Aalst
☎ (053) 77 44 97

Bankkonto
Bankrekening
068-0679940-94
Esperantogroep - Aalst

januaro

20.01 : laborkunveno
21.01 : konversacia vespero
24.01 : jarkunveno + akcepto

februaro

10.02 : laborkunveno
11.02 : 4 membroj registris la esperanto-librojn en la urba biblioteko
28.02 : Jean-Pierre Vanden Daele el Brugge prelegis pri "Radio-elsendoj en esperanto"

marto

18.03 : konversacia vespero
27.03 : laborkunveno
28.03 : Leo De Bruyne el Bruselo prelegis kaj montris diapozitivojn pri Israelo

aprilo

02.04 : speciala kunveno por traduki la broŝuron pri Gent
09.04 : instruista kunveno pri metodo kaj instruiloj
14.04 : laborkunveno
15.04 : konversacia vespero
25.04 : Petro De Smedt el Dendermonde prelegis kaj montris diapozitivojn pri Islando

majo

06.05 : ekzamenoj por la kursanoj
12.05 : laborkunveno
24.05 : serĉpromenado

junio

17.06 : laborkunveno
27.06 : Anne Tilmont el Antwerpen prelegis pri piedmasaĝo kun aktiva partopreno de sufiĉe multe da ĉeestantoj

aŭgusto

18.08 : laborkunveno

septembro

09.09 : komenco de la kurso. Pli ol 20 lernantoj en la unua jaro sub la gvido de Ludo kun propra nova metodo. Dua jaro alterne gvidata de Katja kaj René
18.09 : laborkunveno
26.09 : André Coppé el Liège prelegis pri bieroj kaj bier-produktado. Estis nia lasta kunveno en la salono de la Wembley-pub

oktobro

16.10 : laborkunveno ĉe Monique
24.10 : Marie-Louise Couvent kaj Ingrid Lievens prezentis muzikkvizon. Nova kunvenejo "Sluizeken"
21.10 : konversacia vespero

novembro

06.11 : laborkunveno ĉe Patrick
18.11 : konversacia vespero
28.11 : Katja Lödör prelegis kaj montris diapozitivojn pri la U.K. en Ĉinio.



decembro

11.12 : laborkunveno ĉe Ingrid
16.12 : Pola buso kun kelkaj Polaj esperantistoj, sub la gvido de Leo De Bruyne, venis al la konversacia vespero en la lernejo kaj parolis pri la Jubilea Kongreso en Varsovio. Ankaŭ parolis Kiki Tytgat pri la vojaĝo al la kongresoj en Pollando kiun ŝi organizas por F.E.L.
21.12 : Zamenhoffesto en la "Club Nautique" kun 60-o da parto-prenantoj

Nia grupo partoprenis ankaŭ al aktivecoj organizitaj de aliaj esperanto-grupoj. Jen kelkaj :

- 03.01 : Zamenhoffesto en Aalst - 5 anoj
- 15.02 : Tago de la Internacia Amikeco en Loveno - 5 anoj Ludo gvidis la kantadon
- 09.03 : Ludo deĵoris la tutan tagon en la Naturfoiro en Antverpeno (8-16.III.86) ĉe la stando de F.E.L.
- 13-18.03 : 2-a turisma simpozio en Budapeŝto (Hungario) - 1 ano
- 15.03 : Jarkunveno de F.E.L. en Antverpeno - 2 anoj
- 28-31.03 : N.E.J.-semajnfino en Someren (Nederlando) - 3 anoj
- 04.05 : Trilanda renkontiĝo en Maastricht (Nederlando) - 1 ano
- 23.05 : Stefan McGill estus parolinta en Antverpeno sed ne venis. 4 anoj ĉeestis programon pri gazetartikoloj pri kaj en Esperanto.
- 05-14.07 : IREN-renkontiĝo en Abaliget (Hungario) - 1 ano
- 26.07-02.08 : U.K. en Pekino (Ĉinio) - 1 ano
- 29-31.08 : F.E.L.-kongreso en Blankenberge. 5 anoj ĉeestis la sabaton kaj la dimanĉon dum la ĝenerala kunveno de F.E.L.
- 11.09 : Ludo estis intervjuita de Radio Onyx, loka radio-stacio en Ledeberg, pri esperanto kompreneble
- 02-05.10 : Tagoj de la Kursejo en Pisanica (Bulgario) - 1 ano
- 06-08.10 : Internacia kvizo kaj aranĝo en Razgrad (Bulgario) - 1 ano
- 30.10 : S-ro Lloyency el Pau (Francio) prelegis en Bruĝo pri la esperanto-stelo, -flago kaj -himno - 4 anoj
- 31.10-02.11 : FLEJA-semajnfino en Neerpelt - 2 anoj
- 08.11 : B.E.F.-ĝenerala jarkunveno en Bruselo - 3 anoj
- 13.11 : Prelego kaj diapozitivoj pri la U.K. en Ĉinio en Bruĝo - 4 anoj
- 26.11 : Teatrogrupo el Zagreb (Jugoslavio) "Diablagoj" en Aalst - 6 anoj
- 29.11 : Studotago por instruantoj en Antverpeno - 1 ano
- 05.12 : En Antverpeno prelegis kaj montris diapozitivojn pri la U.K. en Ĉinio Katja - 6 anoj
- 27.12-03.01.87 : 30-a I.S. en Köln (Germanio F.R.) - 3 anoj
- 30.12 : Zamenhoffesto en Aalst - 4 anoj

ESPERANTO-KLUBO LIMBURG
Sekcio de la Flandra Esperanto-ligo
Sekr.: Albert CLAESEN
Zonnebloemstraat 7
B-3610 Diepenbeek
tel.: 011/32.36.03

---

Geplande Esperanto cursussen in Limburg

- Hasselt:

- Cultureel Centrum, Kunstlaan 5, 3500 Hasselt
  15 donderdagavonden van 19.30 tot 22.00 uur
  Aanvang: 11 september 1986
  Prijs: 1500 fr., handboek inbegrepen
  Inlichtingen en inschrijvingen bij:
  Marcel AERTS, Lazarijstraat 122, 3500 Hasselt
  tel.: 011/25.34.67

- Provinciaal Instituut voor Moderne Talen, Elfde-liniestraat 24, 3500 Hasselt, tel.:011/22.95.79
  15 dinsdagavonden van 18.15 tot 21.15 uur
  Aanvang: 7 oktober 1986

- Genk:

Cultureel Centrum, Dieplaan, 3600 Genk
10 donderdagavonden van 19.30 tot 22.00 uur
Aanvang: 9 oktober 1986
Prijs: 1000 fr., handboek inbegrepen
Inlichtingen en inschrijvingen bij:
Jan SLEGERS, Elzenstraat 12, 3600 Genk
tel.: 011/35.49.60



SUPERRIGARDO DE LA JARO 1985-1986

1. Kunvenoj.

Esperanto Hasselt kunvenis dufoje en la monato dum la sezono ( de la 1-a sep.1985 ĝis la 31-a aùg.1986).

1.1. La unuaj kunvenoj de ĉiu monato: Lingvostudoj.

Ili fakte celis plibonigi la lingvokonon de la komencantoj, tamen pro ilia malintereso ni devige ŝanĝis la programon kaj tradukis kelkajn tekstojn, ekz.:

La Vera Dezertspirito
La Danĝero Ekzistas
La Prologo (J. Vandeloo)
La Turisma broŝuro pri Kelchterhoef

1.2. La duaj kunvenoj: precipe amuzaj kaj kulturaj vesperoj.

Prelegoj: M.AERTS, La Universala Kongreso Aùgsburga kun lumbildoj.
J.Vandebergh, J.M.Oeyen, M.Aerts, mallongaj prelegoj.
M.Aerts, Bulgario kun lumbildoj
S-ro Oortman kaj lia Bulgara edzino vizitis nin. Ili montris ankaù lumbildojn kaj rakontis pri Bulgario.
A.Beckers, La Interna Ideo
A.Staes, La praktika utilo
Y.Durwael, Gressillon kun lumbildoj

Distraj vesperoj:
A.Coppé, Esperanto en mia vivo
J.Bovendeerd, Humoraj poemoj
G.Schroeyers, Kantoj
A.Claesen, Vortludoj kaj kvizo.

2. Kiel kutime ni partoprenis la kulturan infoborson en Hasselt (7-9...
3. Ni ankaù partoprenis la komercan borson en Genk (26-4 ĝis 4-5 1986)
4. En la lernejo en Tongeren ni aranĝis info-standon ( 8-5-1986)
5. A.Claesen partoprenis la hobio-borso de EBES en la Limburg Hall en Genk (31-5-1986)
6. Tri kursoj okazis: Esperanto por komencantoj (2 x ) (3-10-85/6-2-...)
   Konversacioj (1 x) (16-10-85)
7. Ankaù tiu ĉi jaro finis du membroj el nia klubo sukcesplene la oficialan kurson en Antwerpen. Gratulon Marcel kaj Jos.
   André Cuyvers kaj Jef Geraerts finis sukcesplene la duan jaron de la sama kurso. Ankaù al ili, gratulon.

8. Nia delegito en la Kultura Konsilantaro de Hasselt partoprenis tri ĝeneralajn kunvenojn (23-3-86, 17-11-85 kaj 15-9-85)
9. Tri lokaj radioj, Hechtel, Hasselt Noordzee kaj Hasselt FM, intervjuis Marcel pri Esperanto.
10. La Esperantistoj el St.-Truiden invitis nin. Kvankam ili fondis grupon kaj ni vizitis ilin trifoje, ni ne sukcesis konvinki ilin aliĝi FEL.
11. Jos Vandebergh estas akceptita de BEF kiel fakdelegito en Limburgo pri turismo.
12. Ni partoprenis la Zamenhofan Feston en Grivegné (14 dec.1985) la malfermo de la semajno de la Internacia Amikeco en Leuven (15-2-86), kaj la trilanda-renkontiĝo en Maastricht (4-5-86)
13. Marcel montris la lumbildojn pri Aŭgsburg en La Verda Stelo en Antwerpen.
14. Marcel, Jos kaj Albert ĉeestis du ĝeneralajn kunvenojn de FEL en Antwerpen (5-9-85 kaj 15-3-86) kaj estas elektitaj kiel administrantojn.
15. Pola geedziĝparo vizitis nin(28-7-86). Ni gvidis ilin tra Limburg kaj vespere agrable kunvenis ĉe Jos.
16. La 9-an de aŭgusto ni organizis serĉpromenadon al Kelchterhoef en Houthalen-Helchteren. La vespero finiĝis per bonega kradrostado en la ĝardeno de Jos. Partoprenis 49 personoj. Bedaŭrinde, nur 6 membroj de nia propra klubo partoprenis ?!!!!

---



Planoj por 1986-1987

Proponoj:

1. Kursoj:
   - Dopa-huis Hasselt
   - Kultura Centro Hasselt kaj Genk
   - Provinca Instituto por Modernaj Lingvoj
2. Partopreni borsojn en Hasselt, Tongeren,Genk enz.
3. Organizi kursojn en diversaj lokoj en Limburg
4. Daŭrigi la informadon tra Limburgo per ĉiuj eblaj rimedoj
5. Krei Limburgan fonduson por propagando, kaj elekti estraron
6. Proponoj por niaj venontaj kunvenoj. Ni ege bezonas novajn ideojn!!
7. Ni planas partopreni la Universalan Kongreson en Varsovio.

## JARRAPORTO = AKTIVECOJ 1986

L.K. signifas "La Konkordo"

Dum la jaro 1986 renovigita vento blovis tra nia Grupo. Kadre de la 60a jara Grup-Jubileo, ni aranĝis diversajn gravajn aktivecojn, kiuj finfine bonsukcesis. Tio signifas reviviĝon de la grupa kaj regiona Esperanto movado.
Jen la plej gravaj eventoj :

### 60a JARA JUBILEO

Sekve al ĝia omaĝo jarfine 1985, L.K. organizis la 8an de marto ampleksan feston. Unue, kune kun pluraj gemembroj de L.K. kaj delegitoj de UEA, FEL kaj amikaj klub-oj, ni vizitis la *"ESPERANTO-FONDAĴO"*-n en la Urba Biblioteko. Poste, en la urbdomo, la urbestraro oficiale akceptis la ĉeestantojn + la gazetaron. S-roj Em.de Bethune, Skabeno pri Kulturo, Ivo Durwael, Gregoire Maertens kaj Gerard Debrouwere faris etajn parolaĝojn. Per manĝo ni finis ĉi tiun neforgesablan tagon en agrabla etoso. Laŭdindaj eĥoj, kun fotoj, aperis en 9 gazetoj. (Vidu apartan dosieron)

### "VRIJE TIJD" - Hallen, Kortrijk

Dum la periodo de la 8a ĝis 13a de februaro ni partoprenis al la "Libertempa Foiro". L.K. prizorgis informstandon kaj ekspozicieton. Sed la ĉefa celo estis propagandi ___ la proksiman kurson. La vizitantoj montris grandan intereson.

### K U R S O

Okazis 6 lecionojn : 28.02, 04, 10, 12, 14 & 18.03, kiel baza iniciado de Esperanto. La nombro de 50 ĉeestantoj -inter ili ĉ 22 gejunuloj - nin certe ĝoje surprizis. 15 Kursanoj iĝis membro. Kvankam ni persone kontaktis 5 grandajn lokajn lernejojn, bedaŭrinde tro malmulte da gejunuloj aliĝis.

### POSTKURSA PROGRAMO

Por kapti la novajn gemembrojn, ni alterne organizis kunvenojn :
a) jen kun sonbendoj + tekstoj + klarigoj : 02.04- 25.04- 13.05- 04.06
b) jen kun lumbildoj + komentarioj : 17.6- 27.06- 15.07- 20.08- 10.09
Samtempe ni pliprofundigis la kursolibron (Dirksen) pere de la gramatiko kaj ambaŭdirektaj tradukoj : 02.04- 25.04- 13.05- 04.06- 17.06- 27.06- 15.05- 20.08- 10.09- 01.10- 22.10- 10.11- 27.11- 18.12-= Pliaj detaloj troviĝas en niaj 14 (Vd. apart. dos.)- informaj cirkuleroj.

### GAZETARA SERVO

Speciale por la kurso, la sekretario de L.K. verkis serion da artikoloj pri Esperanto : origino, deveno, celo, utilo, ktp. Tiu propagando donis bonegan rezultaton. Post la kurso, la propagando daŭrigis, sekve de tio novuloj aliĝis al nia grupo. Ankaŭ la anoncoj de niaj aktivecoj en la loka gazetaro estis fruktodonaj : regule venis novuloj kaj kelkaj membriĝis. (Vidu apartan dosieron)

### ESPERANTA TEATRAĴO

Laŭ peto de la Urba Kultura Komitato kaj okaze de ĝia ĝenerala jarkunveno, L.K. konsentis partopreni en la distra programo. Sub gvidado de la grupsekretario, kelkaj gemembroj kunmetis mallongan skeĉon en Esperanto finlaborita en 9 laborkunvenoj : 11.09- 25.09- 13.10- 05.11- 10.11- 14.11- 26.11- 08.12- 15.12. Aplaŭdo de la publiko post prezentado la 16an de decembro en la Urba Teatro (±400 ĉeestantoj), pruvis la bonsukceson de la ideo kaj ludado. Samtempe estis distribuita 8-paĝan informfolieton pri Esperanto + tradukoj de la teatraj dialogoj + mini-kurso.

### MEMBROVARBADO

Dank' al la listo de FEL, ni kapablis kontaktigi ±40 Esperantistoj (aŭ interesuloj) el la suda parto de Okcident-Flandrio. Nia kontaktletero de la 04.11 estis fruktodona : 18 da izoluloj aliĝis al L.K. Konsiderante la ĉijarajn aliĝilojn, la nombro de niaj membroj preskaŭ duobliĝis : jarfine sumiĝis je 79 !!

.../ 2



### MALFERMO NOVA BIBLIOTEKO

La 24.10 estis oficiale inaŭgurita la Nova Biblioteko. La *"ESPERANTO-FONDAĴO"*-n kiel plenvalora parto de la Urba Biblioteko ĉeestis multaj membroj kaj eminentuloj kiuj subskribis nian *"ORA-n LIBRO-n"*, i.a. la delegito de la Ministro pri Flandraj Kulturaj Aferoj, kiu skribis en ĝi : "Met bijzondere waardering voor Esperanto, dat ook voor België een aantal problemen kan oplossen". Je tiu okazo L.K. organizis ekspozicion,kiu daŭris du monatojn.

### VIZITOJ AL LA *"ESPERANTO-FONDAĴO"*

Menciinda ankoraŭ estas la diversaj vizitoj al la *"Esperanto-Fondaĵo"* de en- kaj eksterlandaj Esperantistoj. Kelkaj datoj: 16.01- 17.01- 12.02- 08.03- 21.03-- 03.04- 19.04- 02.05- 14.05- 26.05- 04.06- 19.06- 01.07- 14.07- 29.07- 05.08 - 06.08- 11.08- 12.08- 13.08- 03.09- 16.09- 23.09- 02.10- 13.10- 20.10- 24.10 - 31.10- 10.11- 21.11- 02.12- 09.12- 22.12- ... Ĉiu vizito/finiĝis per gvidata vizito al la plej interesaj vidindaĵoj de la urbo. plej ofte

### TURISTA INFORMFOLIO kun ESPERANTO-TEKSTO

Ripetfoje L.K. insistis ĉe la Urbestraro, kiu finfine pretis kunlaboron por eldoni kromfolion kun Esperanto-teksto al la ekzistanta informfolio.

### STRATONOMO "Dr.L.L.ZAMENHOF"

La 14.11 ni denove sendis leteron al la Urbestraro por ekzameni la eblecon doni stratonomon "Dr.L.L.Zamenhof". Ĝis nun ili nenion decidis sed transdonis nian peton al speciala komisiono atendante starigon de novaj kvartaloj.

### R A D I O

La 06.03 *"B.R.T.-2 West-Vlaanderen"* elsendis 4-minutan intervjuon de la grupsekretario. Krom ĝeneralaj informoj, L.K. intencis atentigi la publikon por la kurso kaj la graveco de la "Esperanto-Biblioteko".

### KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ... (partopreno)

12-19.07 : Louvain-La-Neuve : 20a Konferenco de ILEI : 3 ĉeestantoj
31.08 : Blankenberge : FEL-Kongreso : 7 ĉeestantoj
30.10 : Brugge : (P k J) : Prelego S-ro LLoancy : 6 ĉeestantoj
28.12-12.01.87 : Budapeŝto : Vintra Esperantista Foiro : 2 ĉeestantoj

### LABORGRUPO II

La delegito de L.K. ĉeestis la kunvenojn de la laborgrupo II de la Urba Kultura Komitato je sekvantaj datoj : 07.04- 11.09- 20.10- 02.12

### BIBLIOTEKO - *"ESPERANTO-FONDAĴO"*

Jarfine 1986 la enhavo estas jene :
5.000 libroj -- revuoj : 9.087 jarkolektoj, t.e. 5.218 jarkolektoj kompletaj kaj binditaj - 1.850 diversaj titoloj

### RESUMO

| | | | |
|---|---|---|---|
| Prez.diapozitivoj | : 5 | Kongresoj, ...(partopreno) | : 4 (18 ĉeest.) |
| Prez.sonbendoj | : 4 | Festo | : 1 |
| Gvidataj vizitoj | : 27 | Laborkunvenoj (teatraĵo) | : 9 |
| Vizitoj al la Esp.Fondaĵo | : 35 | Turista informfolio | : 1 |
| Teatraĵo | : 1 | Radio-elsendo | : 1 |
| Eksp.+info-aranĝoj | : 3 | Laborgr.Kul.Kom. | : 4 |
| Kurso (6 lecionoj) | : 1 | Gazetara servo | |
| Postkursa programo | : 14 | Membrovarbado | |
| Klubkunvenoj (aliaj) | | Akcepto urbdomo | : 1 |
| | | Gazetara konferenco | : 1 |

Agado ESPERANTO 2000 vzw dum 1986.

- kurso por komencantoj '85/86 : finis 4 kursanoj (19.2.86)
- Vesperoj 2000 : dekfoje en la jaro ; meze 10,4 partoprenantoj
- Partopreno FEL-komisiono pri informado k a. : 11.1, 1.3, 15.3 (1 persono) + 7.6.
- 2a/3a-jara kurso '85/86 : 6 lecionoj en '86, finis 6 kursanoj
- revuo Esperanto 2000 regule aperis 6-foje. Redaktas kaj administras FG.
- 12 estrarkunsidoj tra la jaro, 2 administrantaraj kunvenoj (inter kiu la ĝenerala kunveno 5.3.86)
- Semajno de Internacia Amikeco, inaŭgura festo. ĉeestas ± 60 personoj. 15.2.86.
ĉeestas 2 ĵurnalistoj + gazetfotografisto.
- dim. 27.4 : preparkunveno Gambrinusfestoj (laborkunveno)
- 8.5 -- 11.5 : Gambrinofestoj en Urba Parko.
- 8.10 : disdonado informiloj pri la kursoj ĉe stacidomo.
- Informvespero pri la kursoj kaj Esperanto : 15.10.86
- Partopreno UK Ĉinio : 2 gemembroj (GhJ, PV)
- 18/19.10.86 : rapidkurso : 6 kursanoj, + CD (staĝo)
- kurso por komencantoj ekde 22.10.86 merkredvespere. Gvidas ĝin LR ; 12 kursanoj, 9 lecionoj en 1986
- Partopreno FEL-kongreso Blankenberge : 4 gemembroj, 29-31.8.86
- 2a/3a-jara kurso 86/87 : 4 x en 1986, 5 partoprenantoj
- Partopreno Fleja-semajnfino De Winner, Overpelt. Partoprenis 9 gemembroj Eo2000.
- Partopreno studotago FEL por geinstruantoj, 29.11 : 2 el Eo2000.
- Fleja-kunsido Overpelt 1.11, LVS 6.12 : ĉeestas resp. 4 kaj 2 Eo2000-anoj.
- FEL-kadrokurso pri gazetara servo 6.12 : 2 el Eo2000
- I.S. Keulen, studkunveno 'jubileo Eo', 28.12 : ĉeestas 4 gemembroj
- komencis skribaj kursanoj : 8 unuajaraj, 2 duajaraj.
- almenaŭ 38 informpetoj estis detale responditaj.
- gvidliniaro pliprilaborita
- biblioteko 2000 ekaranĝita : ekde nun ĝi funkcias plene.



Agadplano ESPERANTO 2000 vzw dum 1987.

- kurso por komencantoj '86/87 : 6 lecionoj en '87 + ekzameno (18.2.87)
- Vesperoj 2000 : dekfoje en la jaro : daŭra strebado al pli multaj ĉeestantoj. Deko devus esti minimumo, dudeko meze. Ni verŝajne ne atingos tiun celon jam en '87.
- FEL-komisiono pri informado k.a. : eble unu- aŭ du-foje
- 2a/3a-jara kurso '86/87 : finu 4 personoj ; 6 lecionoj en '87
- revuo Esperanto 2000 aperu regule 6-foje. Ekde '87 ĝi aperas laŭ kalendara jaro.
- + 12 estrarkunvenoj en la jaro + 1 administrantara kunveno (post la ĝenerala kunveno de la 11.03.87
- Semajno de Internacia Amikeco, inaŭgura festo. 21.2.87.
- Ni asistu al kelkaj radioelsendoj tra la jaro, i.a. rilate al la temo '1987'. Ankaŭ ni provu aperigi kiom eble plej multe da informoj en gazetoj.
- 28 - 31.5.87 : Gambrinofestoj en la urba parko. Ni havos standon ĉirkaŭ la podio kaj do esperas enspezi multon. Ni jes bezonos multan helpon ...
- Partopreno en la agado de Fleja far kelkaj estraranoj kaj gemembroj. FG kunorganizos la Semajnfinon de Fleja en novembro.
- Partopreno IJK kaj UK en Pollando : diversaj gemembroj.
- Partopreno en kadrokursoj de FEL : kelkaj kadrokursoj, po kelkaj gemembroj kaj geestraranoj.
- Informvespero pri la kursoj kaj pri Esperanto : merkredon 14.10.
- kurso vespera por gekomencantoj : verŝajne 15 merkredoj (+ ekzameno) ekde la 21.10.87. Krom se ni sekvos alian sistemon.
- Ne plu estos 2a/3a-jara kurso. Ni jes anstataŭigos ĝin per pli libera, sed tre lerniga, sistemo : 2a kursovespero en ĉiu monato sep-jun. En tia vespero (la kvara de ĉiu monato) okazu konversacio, teatraĵludado, tradukado, ... Ni serĉas kunlaboranton/kursgvidanton.
- Partopreno Fleja-Semajnfino en novembro : diversaj gemembroj.
- Partopreno FEL-kongreso : ĉu ĝi okazos ? Verŝajne ne.
- Partopreno I.S. Germanio ?
- Verŝajne denove komencos skribaj kursanoj : deko ?
- Ni ankaŭ faros novan informkampanjon. Ankoraŭ decidota de la nova estraro kiom ampleksa. Kaj ni detale respondos al informpetoj.
- Se eble ni organizos specialan kurson por gelernantoj de mezgradaj lernejoj. Ekzemple en Paridaens-Instituto Joris kaj Helga gvidos kurson. Ĉu krome centran kurson organizi ?
- Ni plu ellaboros la bibliotekon, la gvidliniaron, la katalogon de la urba biblioteko kaj aliajn projektojn.

WERKEN VAN SOCIALE
SOLIDARITEIT VAN DE
N.M.B.S.

Sport en geestes-
ontspanning.

BELGA
ESPERANTO
FERVOJISTA
ASOCIO

BEFA

Raimond STEENHOUT
Pamelstraat 296
9400 NINOVE.

al

La Prezidanto de
F.E.L. jarkunveno
ANTVERPEN.

Ninove, I3 - 03 - 1987.

## BEFA-jarraporto

Enkonduko : La prezidanto de BEFA senkulpigas lin, pro lia malĉeesto, sed li devas plenumi taskon en fervoja medio.

BEFA daŭre agadas precipe en fervojista rondo. Pasintan jaron ni organizis nian jarkunvenon en Spa, kun okdek gepartoprenintoj. El diversaj limlandoj estis delegacio : El Nederlando, Germanio, Francio kaj Anglio.

Post nia jarkunveno BEFA-anoj partoprenis en la IFEF-kongreso en Skopje (Jugoslavio) estis pli ol sepcent kvindek da gepartoprenintoj el dekok landoj. Plue membroj de BEFA partoprenis en la jarkunvenoj de GEFA en DUISBURG kaj de FFEA en PARIS ankaŭ en la Katalunia kongreso en LIRIDA. Membroj de BEFA partoprenis ankaŭ en la U E A kongreso en PEKING.

Grave estas ke ek de oktobro I986, ni disponas pri du salonoj en la ĝenerala direkcio de N M B S en BRUSSEL. Kie ni ek de tiam donas du esperanta konversaciaj kursoj, ĉiam la unuan kaj trian sabaton antaŭtagmezo. Por komencantoj kaj progresantoj.

Tiuj kursoj estis anoncota en du personar monata revuoj: 'Het Spoor' kaj 'Le Rail' presitaj je pli ol centmil eksemeroj po monato.

Cetere ĉiuj niaj aranĝoj estas anoncitaj en tiuj.

Tiuj-ĉi komunikoj estis resumo de BEFA-agado en mil naŭcent okdek ses

Protokolis
*R. Steenhout*
R. STEENHOUT



## S E K R E T A R I A R A P O R T O 1 9 8 6

Ke la jaro 1986 estis la ĉefa preparperiodo de la jubilea jaro, estas ne pli ol normale kaj ke dum tiu periodo multo okazis tiurilate ne estas malpli normale.

Kadre de la estraraj laboroj, vi jam scias ke tute specialan atenton ricevis la al-ekstera aspekto de ĉio, kio koncernas Esperanton en niaj regionoj. La rezulto de multe da kunsidoj, pridiskutoj kaj kontaktoj kun ĉefe profesiaj publiculoj jam realiĝis. Ni jam disponas pri nova leterpapero kaj ĉio kio koncernas leterumadon kaj eĉ povas ĝoji ke la diversaj grupoj sekvis en tio la konsilojn de la estraro. Jen cetere la plej karakteriza trajto de la Flandra Esperantomovado, pri kiu aliaj samspecaj organizoj envias nin : komuna agado. Pri tio ni vere povas ĝoji. Dankon al ĉiuj.

Krom tiuj specife jubile-direktaj okupadoj, okazis aliaj aferoj, kiel :

- la transpreno de la eldonejo STAFETO kun ĝia librorondo
- la fin-fina apero de la Prisma-vortaro
- propagandkampanjo, pri kiu ankaŭ temas ĉi-supre
- la jam tradiciiĝinta Semajno de Internacia Amikeco en Leuven
- diversaj ekspozicioj
- propono al la Provincaj Komisionoj por konsili pri loknomoj por bonvole prikonsideri pri-Esperantan nomon por stratoj kaj placoj, propono kiu tamen ricevis ne alian sekvon ol rifuzon.
- la 100-a numero de ESPERANTO PANORAMA
- tre sukcesa - ankaŭ finance - kongreso en Blankenberge
- la konsento de la librejo " 't Spectrum" pri distribuado de nia memstudopaketo pere de kutimaj librovendejoj
- la kunmeto de jubilea patrona komitato
- studotago por instruantoj (29 11 86)
- studotago de la Gazetara Servo (06 12 86)
- libroborso kun aparta - kvankam eta - stando ene de la stando de 't Spectrum
- kiel vi jam rimarkis, nova ŝildo je la fasado de la Esperanto-domo
- reorganizado de la endoma ĉambro- kaj meblar-aranĝado
- kaj, se mi nenion forgesis, la antaŭfiksado de serio da radio- kaj Televid-elsendoj.

Malpli ĝoja estas la forpaso de la ĉefdelegitino de BEF, F-ino ORSOLINI. Io, kio denove zorgis por kelkaj frotadoj en rilato kun ŝia anstataŭigo.

Jen birdoperspektive la ĉefaj okazintaĵoj kiuj koncernas nin ĉiuj kune.

Pri la grupaj aktivecoj, vi jam aŭdis la raportadon de la diversaj koncernatoj.

Pri la detala tabelo pri grupaj aktivecoj, kiun vi jam iomete kutimis trovi sur la tabloj okaze de la ĝeneralaj jarkunvenoj, mi devis ĉi-jare rezigni ĉar nur tri grupoj ensendis siajn informojn ĝustatempe.

Sed, aparte de la nura raportado pri kio okazis en 1986, estas mia sekretaria privilegio fari, kion oni nomas, moralan raporton. Tio signifas ke mi rajtas ĉu laŭdi, ĉu admoni, ĉu fanfaroni, ĉu grumbli, ĉu bedaŭri, ĉu kontenti, ĉu komenti, ĉu aprobi, ĉu malaprobi, ĉu prognozi, ĉu proponi, ĉu .... relativiĝe averti ... por ke ne aplikeblu la famkonata proverbo pri la infana maneto kiu facile pleniĝeblas ...

Ja vere, dank'al daŭre kreskanta agado en la antaŭaj jaroj, la preparoj, do, ni nun povas ĝoji ke okazas kaj okazos tiom da aferoj en la gazetaro, radio kaj Televido. Vera sukceso !

Sed, karaj geamikoj, ke ni tamen ne blindiĝu pri la jamaj akiraĵoj, ke ni ne opiniu ke, dank'al tio, nia daŭra aktiveco ne plu estus necesa, ke ni jes fieru, sed ne opiniu ke sufiĉus havi tre aktivecplenan jubilean jaron, por ke ĉio solviĝu, jen mia zorgo.

Nu, en tiu rilato kaj konsiderante ke ni nun travivas epokon de analizoj, - ni ja jam kolokvis por analizi la kialojn de la stagnado de la membronombro, ni jam seminariis por analizi la rimedojn por plibonigi la rilatojn, ni jam studotagis por analizi la kvalitojn de kurs- kaj kunvengvidado kaj ankaŭ jam aperis sufiĉe ampleksa artikolserio pri Transakcia Analizo - en tiu rilato, do, mi volus proponi aŭ prefere lanĉi defion al kandidatanalizistoj pri alia fenomeno, ankoraŭ ne analizita laŭ mia scio. Nome pri tiu fenomeno, kiun Toon Hermans nomis la "Simi-instinkto" (het Apeninstinct).

Jen traduko de parto el lia rezonado :

" Kapitalforta usona sinjoro pripensas kun sia "penso-stabo", sia "cerbumgrupo" pantalonon por gejunuloj, do por ambaŭ seksoj, ĉar tio pligrandigas la merkaton.
La pantaloneto estas blua, ĉarma, june-blua, do ankaŭ alloga por pliaĝuloj kiuj volas aspekti iom pli junaj. Decas ke ĝi streĉe sidu ĉirkaŭ la sidvangetoj kaj ne tro multe kostu. Ili donas al la pantaloneto svingan nomon en kiu pakiĝas akustika "kiko" kaj por igi ĝin iom pli originala, ili enbatas kelkajn vinktojn, kelkajn nit-najletojn kaj la nit-pantalono, "de spijkerbroek" blu-blu-blue promenas en la mondon.
Je iu sagace elektita tago "la unua blua" pasetas sur la trotuaroj de New York City.



" Hee ! What's that ? ... Mi ankaŭ volas tion ! Tio estas nova ! "
La simi-instinkto.
Unue unu pantaloneto, poste du, tiam tri, sekvas dek, mil bluaj pantalonetoj kaj fine dek milionoj da blu-blu-bluaj pantalonetoj.
La afero sukcesis. La simi-instinkto denove pruvis ke ĝi ankoraŭ loĝas en ni ".

En Esperantujo kaj ankaŭ ĉe ni en FEL, prezidantoj ĉirkaŭataj de specialistoj kaj aliaj cerbumantoj pristudis kaj pripensis kaj pri-esploris la "merkaton". Jam multo realiĝis. Mi ne devas denove detaligi ĉion, kio jam pretiĝis. Mi nur konstatas ke Esperanto ankoraŭ ne evoluis ĝis sur la trotuaroj. Eĉ la profesiuloj ne venis al la teorio de Toon Hermans. Al la simi-instinkto, do.

Esperantistoj, kiam ili devas ien iri, iras aŭtomobile. De unu pordo ĝis la alia pordo. Tiuj, kiuj vojaĝas alimaniere, trajne, trame, buse, bicikle aŭ eĉ piede, kaj do uzas la trotuarojn, haste laŭlongas la fasadojn kaj preskaŭ kaŝe-haste enŝoviĝas (ekzemple ĉi tie) en la Esperantodomon. Unufoje interne, ili larĝe malkovras la Esperanto-insignon (nu ja, pri kiu insigno fakte temas nun ? ), intersalutadas Esperante kaj poste, en multe da kazoj, daŭrigas la konversacion Flandre. Sur la trotuaro - kaj per tio mi celas en la granda publiko - nulo, nenio, "noppes" !

Pri Esperanto ni povas legi en la gazetaro. Pri Esperanto ni povas aŭdi je la radio. Pri Esperanto ni povas spekti je la televido. Eĉ tre interesajn programojn en unu el kiuj tre ĉarma knabino tre ĉarme kantas tridekon da fojoj " D-ro Zamenhof el Bialistok' " kaj tiel ĉiu sciis, ke temas pri Esperanto. Kaj la organizintoj kaj kunludintoj estas feliĉaj kaj la respondeculo de la Centro iomete - kvankam ne malkontente-grumbletas pro troa laboro kaj la cetera Esperantistaro beate pli-al-fundiĝas en sia fotelo, tre kontenta ke la kutimaj nelacigeblaj st... idealistoj plian fojon sukcese laboris. Krom tio, en la ĉiutaga vivo kaj eĉ en specialaj cirkonstancoj,ne da Esperanto .

Esperanto, la Internacia Lingvo. La nura !

Okazas diversaj internaciaj aranĝoj ĉiujare. Por nomi nur du : la Internacia Muzikfestivalo por la Junularo kaj la Internacia Festivalo de la Folkloraj Dancoj. Veraj internaciaj aranĝoj, tute konvenaj, tute oportunaj por Esperanto kaj kio mankas ? Ĝuste : Esperanto.

Vi nun ne kredu ke mi prigrumblas vin. Ne, ne ! Mi nur volas atentigi vin ke ŝajne, kiel ajn detale, kiel ajn profesie ni alfrontis la jubilean jaron, kiel ajn pene kelkaj inter ni laboregas, tiu eta "fina tuŝo"

(the final touch), la simi-instinkto ne aperis en la planoj. Kaj bonvole ne sentu vin kulpaj, ne sentu vin ofenditaj aŭ eĉ nur maltrankvilaj. Se eĉ la profesiuloj ne pensis pri tio, kiu inter ni meritus malaprobon ? Kaj ankaŭ mi mem devas ne fanfaroni. Se mi ne tute hazarde - sed ĝustatempe tamen - estis leginta tiun verkon de Toon Hermans, ankaŭ al mi la ideo pri la simi-instinkto ne estus veninta. Pura hazardo, do.

Toon Hermans cetere ankaŭ diris : " Ĉio evoluas kiel ĝi devas evolui" aŭ pli ĝuste "Alles loopt zoals het lopen moet".

Do, ni ne malesperu, eĉ ne malkontentiĝu. Ni nur ne forgesu ke post la jubilea jaro la agado devas pludaŭri. Pli intense eĉ. Ĉiam pli kaj pli intense. Tio laŭ mi estu la neevitebla evoluo. Se ne, ni riskas denove eniri periodon de letargio, atendante novan verŝajnan jubileon.

La afero ŝajnas al mi meriti nian atenton. Mi mem jam kelkajn fojojn spertis kiom gravas publika uzado de la lingvo. En la lastaj semajnoj tio okazis tri fojojn, nome en la vagonaro inter Antverpeno kaj Bruselo. Kontrolistino - kiun vi cetere tre bone konas- ĉe la kontrolado de la transportbiletoj alparolis min Esperante. Post la kontrolado ŝi revenis al mi kaj dum la veturado ni diskutis Esperante. En ĉiuj tri kazoj, iu vojaĝanto demandis al ŝi kiun lingvon ni parolis. Kaj ĉiufoje ili, kvankam flustre, diskutis inter si pri tiu lingvo, kiu nomiĝas Esperanto.

La simi-instinkto eble ankoraŭ ne tute aperis, sed certe jes estis vekita. Fenomeno analizinda.

Por reveni al la gazetartikoloj, radio- kaj TV-elsendoj: Ĉu vere vi kredas ke ĉiu gazetleganto, ĉiu radio-aŭskultanto aŭ TV-spektanto interesiĝus pri tiuj programoj ? Ne tamen. Eĉ ne ĉiuj tielnomitaj kultur-amantoj .

Kaj dum ni penadas por Esperanto, kio okazas "sur la trotuaro" ? Flandraj ŝikulinoj balbutas France, Holandanoj surventriĝas por ĉio, kio iel similas la Anglan, Germanoj blufas pri "Das Grosse Vaterland", Francoj koketas pri "l'esprit français", la grandpotenculoj eldonas amason da mono por la disvastigo de sia lingvo kaj dume fabrikas amasmurdilojn pagante ŝnirmonon al politikuloj el pli malgrandaj ŝtatoj por ke ili transprenu la armilkomercadon kaj laŭ demokrata maniero malice instigas al daŭra militado, dum en certaj mondopartoj la homoj putriĝas pro mizero.

Kaj dume, la Esperantistoj jubileas kaj neŭtrale festadas.



Jen, amikoj, pensu foje ankaŭ pri tio. Bonvole enmetu ankaŭ tion en viajn laborplanojn kaj profitu el tio. La Francoj dirus : "Prenez-en de la graine".

Miaj karaj, mia intenco ne estis malfermi la kranon de malvarma duŝo super vi, ne estis estingi vian entuziasmon. Certe ne. Mi volus nur instigi vin al sobra pripensado, al sobra prikonsidero de ĉiuj faktoj de la normala ĉiutaga vivo. Se ni volas bonfari al Esperanto, se ni volas disvastigi Esperanton laŭ la intencoj de nia ĉies Ludoviko, tiam ni devas ankaŭ kalkuli je ĉiuj aspektoj de la ĉiutaga vivo, do ankaŭ je la simi-instinkto.

JB.

4. Konkluda vorto de la prezidanto.

1986 estis jaro de riskoj, sed de kalkulitaj riskoj :
- transpreno de STAFETO
- kreo de nova domstilo
- aĉeto de stoko de la Prisma-vortaro

1986 ankaŭ estis jaro de pragmatisma kunlaboro en amika etoso, tiel ke restis tempo por vere labori.
Certe meniciindas la grava laboro farata de GCA al kiu dankvorto pleje konvenas. GCA ege bone kunlaboras kun FEL. La nova domstilo cetere originas ĉe ili.
La prezidanto ankaŭ dankas al la grupoj pro la bona kunlaborado kaj i.a. pro la senproblema akcepto de la nova stilo, io, kio donas jam siajn fruktojn. Plie li dankas pro la multaj sukcesaj aktivaĵoj.
Ĉu tio signifas ke ni povus "ripozi sur niaj laŭroj" ? Ho, ke ne ! La laborado pludaŭru tiel volontule, kiel kun profesiuloj.
Li kostatas emon al kritiko, ĉar certaj atenditaj aferoj ne realiĝis. Nun en 1987 la atendoj estas grandaj. La risko ke ili ne realiĝos komprenebla ankaŭ estas granda.
Li avertas do kontraŭ tro rapida kritiko,alvokante al bonvola kunlaboro.

II DUA PARTO.

Prezidas Paul Peeraerts.

A. Eksigo de la estraro

B. Akcepto de la administrantoj

Provinco Antwerpen

- LA VERDA STELO : Ray Gerard
  Dirk Deweerd
  Alex Humet
- LA ERIKEJO - Kalmthout : Edward Symoens
- Mechelen : Roger Saels
- Mortsel : Jan Bovendeerd

Provinco Brabant

- Brussel : Jef Staels
- Leuven ESPERANTO 2000 - Luc Rijnders

Provinco Limburg

- Beringen : Alfons Beckers
- Hasselt : Albert Claesen

Provinco Okcident-Flandrujo

-Knokke : Albert Marmenout
- Brugge PACO KAJ JUSTECO : Georgette Wybouw

Provinco Orient Flandrujo

- Aalst : Erik D'Hondt
- Gent : LA PROGRESO : Arpad Lödör

Administrantoj pro funkcio

- Paul Peeraerts, direktoro de GCA
- Jean Pierre VandenDaele : reprezentanto de FLEJA

Kooptitoj

- Roland Rotsaert
- Hilde Vaningelgem-Vandriessche
- Cesar Vanbiervliet
- Ivo Durwael
- Jos Vandebrgh. Monique Caestecker

Tiu ĉi administrantaro estas unuanime akceptita.



C. Elekto de nova estraro

- kandidatoj (alfabete
  Jan Bovendeerd
  Monique Caestecker
  Ivo Durwael
  Alex Humet
  Roland Rotsaert
  Edward Symoens
  Hilde Vaningelgem-Vandriessche

Ĉi kandidatoj estas unuanime akcpetitaj.

D. Elekto de prezidanto :

Krom unu deteno, aplaŭde reelektiĝas Ivo Durwael.

E. Estonta agado.

La estraro kunvenos je sabato 11 de aprilo 1987 por dividi inter si la diversajn taskojn kaj por fiksi sian labor-planon/kalendaron.

Fino 17.00 h.

JB

-----------------

La interhomaj rilatoj en FEL XIII - Ivo Durwael

KIEL MI STRUKTURIS MIAN TEMPON

En la daŭro de la jaroj, iom post iom - preskaŭ nerimarkeble - mi prenis pli kaj pli da taskoj sur min. Iun tagon, mi akceptas taskojn kun entuziasmo, en alia tago mi spertas ilin kiel pezan premon. Okazis, ke mi iom senespere pensis : "Ĉu Esperanto estas kreita por la bono de la homaro ? Diable, mi suferas pro ĝi !" En alia tago, kiam mi pigre kuŝas en fotelo, mi havas konsciencriproĉojn ĉar mi ne okupiĝas pri farendaĵoj ... kaj mi ne komplete povas ĝui ripozon. Sed feliĉe mi jam trovis solvon por tiu problemo. Ĝi estas la rezulto de multaj ideoj, kiujn mi ĉerpis el diversaj fontoj. Sed por mi kaj espereble por via inspiro gravas nur la konkludoj.
Dum iu feriotago, mi skribis longan liston de ĉio kion mi ŝatus fari en mia vivo. Alian tagon mi reprenis tiun liston kaj provis traduki tiujn ideojn en konkretajn agojn. Ekz. aktualigi miajn pedagogiajn konojn fariĝis ĉiusemajne legi unu ĉapitron el interesa pedagogia libro.
La longan liston de miaj deziroj mi resumis en naŭ celojn. Ŝajnas ke la cerbo sukcesas okupiĝi maksimume pri naŭ temoj. Nepre du tutpersonaj bezonoj necesas.

Se oni okupiĝas pri pli da celitaĵoj samtempe, tio malagrable perturbas niajn pensojn kaj ni perdas orientiĝon. Sed eĉ tiuj naŭ celoj montriĝis tro komplikaj por strukturi mian tempon. Finfine mi decidis dividi mian vivon inter mia familio, mia profesio, mia persona tempo kaj Esperanto. Tiam mi prenis kvarkoloran skribilon. Feliĉe mi ricevis agendon, kiu enhavas dividon de la tago laŭhore. Por unu monato mi dividis mian tempon en kvar koloroj. En ĉiu tago mi rezervis parton por mi persone : tio signifas la momenton, kiam mi agas tute laŭ mia plaĉo. Ĉiun monaton mi iom korektis mian skemon, kiam mi havis la senton ke mi en la antaŭa monato neglektis ion. Kaj de tempo al tempo, mi faras unu longan unukoloran strekon : dum karnavala ferio por la familiaj bezonoj, dum la paskaj ferioj por la personaj bezonoj kaj dum la UK en Varsonio por Esperanto ktp.

Tiun skemon mi iom post iom plenigas per konretaĵoj, plejofte nur por la venonta tago.

Tiu skemo helpas min por prokrasti rendevuojn aŭ por preni novajn iniciatojn kiam mi jam havas plenan tagordon. Ĝi ankaŭ malhelpas min por fariĝi laca. Krome mi antaŭvidas "manĝetaĵojn". Por kompreni tiun metaforon, vi pensu pri malgranda muso, kiu sukcesas manĝi tiom da fromaĝo sen sperti misdigeston. Ĝia sekreto estas ke ĝi manĝas porcieton ... forkuras ... revenas kaj denove manĝetas ... ktp. Simile, mi antaŭvidas aferojn, kiujn mi povas fari en nur kelkaj perditaj minutoj, ekz. legi unu artikolon el revuo. Tiamaniere mi legas miajn revuojn, sen disponigi tempon por tio.

Evidente mi regule pekas kontraŭ mia skemo. Se iu esperantisto neantaŭvidite vizitas min por paroli pri muvada problemo en mia familia tempo, mi ne forsendas lin. Sed mi provas trovi kompenson en la sama tago aŭ en la posta por konservi la ekvilibron. Se ankaŭ tio ne eblas, tiam mi ne volas trokomplikigi mian vivon kaj mi forgesas pri tio. Sed tia perturbo, kelkfoje en la monato, ne ĝenas mian vivoĝojon.

Efektive, ŝajnas al mi ke mi nuntempe pli multe faras, sen laceco, kaj precipe kun pli da ĝuo !

Tion mi ankaŭ deziras al vi.

ID